

Beri-kuiru !

Kulinaraj specialaĵoj de mia regiono

Kokidaĵo «en barbouille» (barbuj')

Ĝi estas kokidaĵo kuirita kun speciala saŭco. Kiam oni bučas la beston, oni prenas la sangon kaj almetas iomete da vinagro: la sango devas resti likva. Vi kuiras la kokidaĵon kiel la «kokidaĵon je vino», sed la saŭco estas miksaĵo de vino kaj sango. Estas plado de festoj.



La paska pasteĉo

Ĝi estas farita el m u r b o , v i a n d o kaj ovojn. A n t a ŭ e , dum la k a r e s m o , oni ne devis m a n ĝ i ovojn, do

oni metis ilin en la pasteĉon. Mia avino metis du viandspecojn: porkan kaj bovidan. Ŝi diris ke tial ĝi estas malpli seka. Vi preparas la paston, sur la duonon vi metas la viandojn kaj duonan ovon, kaj kovras per la resto de la pasto. La pasteĉo havas ĝibon kiel kamelo! Mi memoras ankoraŭ kiam la pasteĉon oni eligis el la forno, orkoloran. Kia plezuriga manĝo!

La terpomo-flano

Ĝi estas farita el faruno, terpoma pureo, kazeo kaj butero. Oni bezonas tiom da faruno kiom da pureo kaj preskaŭ tiom da butero. Oni prilaboras ĝin kiel foliigitan paston. Ekzistas pluraj receptoj. Mia bakisto havas sian, mi havas mian. Se vi havas tempon, vi povas fari ĝin!

«Sanciau» aŭ «chanciau» (sancjo/ŝansjo)



Ĝi aspektas kiel krespo, pli dika, sed estas la sama pasto malpli likva.

Ĉiu kuiristino havas sian recepton. Oni povas e n m e t i m i e l o n , pomon aŭ


surmeti ovon. Mia avino, laŭ mia memoro, almetas nenion. Estis nur la pasto de la krespo. Kiam unu flanko estas kuirita, vi devas kovri ĝin per telero, turni ĝin kaj kuiri la alian flankon.

Vi trovos ĉiujn receptojn sur interreto.

Michèle LongueEpée

Lastaj informoj pri

Pliaj programeroj



Sabaton la 7an, je la 15a. Pjer Buvje prezentos Ĉu Esperanto estas Fundamente facila?

kiun li jam prezentis en la pasintjara kongreso en Seto, sed en tro malgranda ĉambro, tiel ke kelkaj ne povis enveni, kaj kun tro kurta tempo, tiel ke ne elĉerpiĝis la prezento.

La temo estas plu detaligita ĉe la reto <http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php?Lingvo=fr&Temo=Prelegoj>

Li plie kontraŭbase akompanos Ĵak Le Puil dum la vespera koncerto.

Lundon la 9an, je la 16a. Marie-Thérèse Lloancy

prezentos la libron, kiun ŝi tradukis
Urboj por ŝanĝi la mondon
de André Cazetien



La eksterordinara aventuro de la urbo Mourenx, unua nova urbo en Francio, unua laboratorio laŭ la filozofo Henri Lefebvre, kiu ebligas nutri tiun revon «ŝanĝi la mondon».

Instruisto, kiu fariĝis urbestro de Mourenx dum dek ok jaroj, André Cazetien aparte fieras pri la fakto ke li faris Nelson Mandela-n, tiam plu en karceron, honora civitano de l' urbo.

La libro ne jam estas en la katalogo de la libroservo, sed estos surloke aĉetebla. (15€, ~ A4, 116 paĝoj)



Lundon la 7an, je la 14a. Guy Martin kaj Ŝtonĉjo prezentos debaton Atomo kaj socio.

Ingrediencoj:

- . 60 g da faruno
- . 125 ml da lakto
- . 1 ovo
- . pinĉpreno da salo
- . 1 kulereto da pira likvoro
- . 20 g da butero
- . 2 pomoj
- . pulvora sukero, aŭ mielo laŭ gusto

Preparado

- Miksu la farunon, la lakton, la ovon kaj la salon, same kiel por krespoj.
- Purigu kaj senŝeligu la pomojn.
- Ilin tranĉu lamforme.

- ilin origu kun butero en pato.
- kiam origitaj, verŝu la likvoron kaj ĝin flamigu.
- aldonu en la krespan paston kaj zorge miksu la tuton.
- tion kuiru en larĝa pato dum ĉirkaŭ sep minutoj je milda temperaturo.
- kovru la paton per telero, kaj turnu la tuton: la krespo nun troviĝas en la telero, la kuirita parto supre.
- Glitigu ĝin en la paton, por finkuiri la ne plene kuiritan flankon, dum proksimume 3 minutoj.
- Sukerumu laŭ gusto, kaj ĝin manĝu tuj.

Kursoj dum la kongreso.

Tradicie, dum kongresoj okazas «inicad-kursoj», kaj mi jam ricevis du demandojn, kial ne ĉi kongrese ?

Unue, mi starigas la demandon: al kiu direktiĝas tiuj kursoj en kongresoj ? Mi ricevis du respondojn:

1- Al lokaj enloĝantoj, propagandcele.

Bone. Mi havis la okazon spekti tian kurson, gvidatan (lerte !) de Vinko Markovo okaze de Homara Festo (vidu LS 58 «ilia tute unua leciono»). Sed ni ne forgesu ke tiu kongreso estas «sav-kongreso» t.e. kiu ne fontas el propono de la loka grupo, kaj surloke krom ge-Houviez (kiujn mirakle ni trovis) oni ne povas tro kalkuli pri ago direkte al la loĝantoj. Cetere neniu disponeblas por gvidi tian kurson.

2- Al kunul(in)oj de kongresanoj, kiuj ne estas mem esperantistoj, aŭ al komencantoj, kiuj deziras baniĝi en Esperanta okazaĵo, tamen kun nivelo ne sufiĉa por bone kompreni, ĉefe dum la plenkunveno.

Efektive, prefere al enuo, indas organizi ion por tiuj personoj.

Ni do decidis organizi paralele al la du matenaj plenkunvenoj (dimanĉon la 8an kaj lundon la 9an) aranĝoj por tiuj personoj, ĉele al progresigi ilin en la uzado de Esperanto. Por la aliaj eroj de la programo, la koncernaj personoj normale ne devus enui, eĉ dum la labor-grupoj de la dimanĉo posttagmeze, ĉar certe iuj povos helpi al kompreno, kaj ja eblas interveni (sen troigi tamen) en la franca.

Do kvankam tio ne estis aparte antaŭvidita en la aliĝilo, bonvolu indiki en la parto «apartaj petoj» ke vi deziras profiti el tiu aranĝo.

Se iu sin sentas pli utila en gvidado de tiuj «kursoj» ol en partopreno en la plenkunveno, tiu sin anoncu en la rubriko «Diversaĵo, alia propono»

* Se vi estas koncernata sed jam sendis vian aliĝon, indiku rete kion mi aldonu;

* Se vi ne jam aliĝis pro la fakto ke ne aperis tiu ebleco, vi tamen povos profiti de pli frua kongreskotizo. Petu tion rete:

satam.kongres67@free.fr
Serĝo Sir'

Pri la aliaj prelegoj.

Male al tio indikita en LS80, la prelego de Nathalie (**Kvin monatoj en Brazilo**, lunde, je la 14a) okazos en Esperanto.

«En français, ouvert au public» fakte koncernas tiun de Cédric kaj Alice, Sabate je la 17a: «**Plus de deux ans à vélo-couché**».

La dimanĉa prelego «**Humuro en La Kancerkliniko**» de *Ĵak Le Puil* ekos je la 17a, ne je la 18a kiel antaŭe anoncite.

Sabata ekskurso vizito de la urbo.

El la jam enskribitaj kongresanoj, du trionoj deziras partopreni tiun ekskurson.

Ni do planas tri grupojn, du ĉiĉeronatajn en Esperanto, unu en la franca.

La ekskurso disvolviĝos tiel:

-Piede ĝis la bus-haltejo: 5 minutoj maksimume.

- Bus-tempo : ĉ. 15 minutoj

SAT Amikaro	
Alvoko al kandidatiĝo	14
SAT-Amikaro - Kongreso	
Lastaj informoj	1-3
El nia leterkesto	3
Kongreso inter akvaj muelejoj	12
La muelejoj de Piot	13
Analizoj/opinioj	
La nevidebla mano ..	8/9
Pri komunikado, instruado, lernado	10/11
Rezisti, verbo as-texez uzenda.	10/11
Lingvo	
Kiel traduki : Trait	5/6
Legindaj legendoj	10
Libro-servo	6
Recenzoj	
Libro vivas pli longe ol unu sezono	7
Humuraĵoj-diversaĵoj	
Beri-kuiru.	2
Selle-humuraĵoj	7,14
Ve, Vege !	9
HuMorelaj Linioj	14
BD: La tribuloj 7	16
Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement	
Stage Nantes	15
Recherche traducteurs	15
Quetigny, Melun	15
J. Yvart, Ben Jelloun, Greziljono	16

-Vizitado : piede evidente : ĉ. 2 horoj (ne ĉiam paŝante, evidente !)

- reveno (simetrie : 15 min + 5 min)

La grupoj foriros laŭvice per la busoj de 14h14, 14h31 kaj 15h00.

La unua revenos per tiu de 16h38, kio ebligas ĉeesti la prelegon de Cedric kaj Alice «Plus de deux ans à vélo-couché»

En la aliĝilo, indiku vian preferon (se necese) 1a/2a/3a grupo; EO/FR. Retu se vi jam sendis vian aliĝilon.

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo. **Enpaŝiganto** : Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo** : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de**: Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Andreo Hoaro, Jorgos, Ŝtonĉjo. **Partoprenis en ĉi numero**: Andreo Andrio, Erikĉjo Eliard, Mireille Grosjean, Isabelle Jacob, Klod, Ĵak Le Puil, Michèle LongueEpée, Lin' Morel, Jean Selle, Serĝo Sir', Ŝtonĉjo, Juliette Ternant.

Ĉar februaro kurtas, kaj por informi kiel eble plej freŝe pri la kongreso, LS83 aperos ĉ. la 20an de marto.

Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Retu : **lasago@free.fr**

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Laboraj kunvenoj

Komitato :

Vendrede vespere (ekster kongresperiodo), sekvo sabate tagmeze, laŭ surloka interkonsento.

Perantoj :

Sabate je la 15a, gvidata de Vito.

Unua, plena :

Dimanĉe je la 9a, malfermo kun salutvortoj, agadraporto, ktp.

Dua, en 3 laborgrupoj :

Dimanĉe je la 14a.

* Estonto de La Sago (Nova redakta skipo, Fr:suplemento, ktp) : animanto ne jam difinita.

* Celokestonto de la asocio kstatutŝanĝa propono de la dinana grupo : Filipo. Vd LS79 P4.

* Kunsido por akcepti novulojn kaj nemembrojn kaj prezenti SAT : Gimo.

Tria, plena :

Raporto pri laborgrupoj, ontaj kongresoj, diversajoj, Jalta SAT-kongreso.

Diversaĵoj

Prezento de la SAT-Kongreso en Jalto.

Juna sat-kongresanino el Jalto, kiu planis veni Ĉatorusen por (i.a.) tion fari, devis fine rezigni pro tro ŝarĝita studperiodo. Ve por ni, sed sukceson al ŝi !

Plu pri la kongres-kromaĵo: Sufiĉis unu muelejo...Isabelle Jacob komunikas:

Ni intencas eldoni broŝuron pri la historio de la Muelejoj aĉetebla je la prezo: 1€.

Laŭ la kvanto de la partoprenantoj, ni organizos kunveturadon aŭ ni mendos buson.

Praktikaj informoj pri la urbo, dum la kongreso.

Jocelyne Monneret, kiu longtempe loĝis en Ĉatoruso, sin proponis por helpi OKKon en tiu utila servo.

ERATUM: Mankas 4 ciferoj en la IBAN kodo de la kongresa ĉek-konto
Jen ĝi korektita: **FR07 2004 1010 1701 8662 L02 876.**

FEI-Ekzamenoj

La ekzameno por Atesto pri Supera Lernado (Eksa «Komuna trunko») estos organizata okaze de la kongreso, Sabaton la 7an de Aprilo, kondiĉe ke sin anoncu minimume kvar kandidatoj antaŭ la 8a de marto. (Do interesatoj sin tuj anoncu, por esti informitaj ĉu la sesio okazos.)

Skriba parto :

(nur uzo de PIV aŭ PV permesata)

9-12 : Redaktaĵo pri temo elektita de la kandidato inter tri proponitaj (minimume 200 vortoj, t.e. de unu ĝis kelkaj paĝoj, laŭ la dimensio de la skribo de la kandidato).

14-18 : Altraduko kaj Detraduko, (ĉiu el la tekstoj, prozaj, entenas inter 150 kaj 200 vortojn).

Parola parto

Tuja traduko de deko da frazoj pri la ordinara vivo + Demando pri la postulataj scioj : priskribo de la lingvo, teknikoj de instruado de Esperanto, historio de la esperantista Movado, literaturo, aparte de la kvar verkoj en la programo.

Horoj laŭ interkonsento kun la kandidatoj.

La ekzamen-kosto por ĉi nivelo estas 15 €, pagenda surloke al la FEI organizantoj.

Pluaj aliĝoj (31-01):

13	Lachassagne Daniel	03
14	Andrieu André	12
15	Andrieu Paulette	12
16	Pinet Thérèse	75
17	Guihaume Françoise	72
18	Monneret Jocelyne	71
19	Graven Henri	64
20	Graven (S-ino)	64
21	Cavalier Guy	93
22	Lloancy Marie-Thérèse	64
23	Dumoulin Yannik	17
24	Dumoulin Janine	17
25	Martin Guy	22
26	Leveque Franjo	22
27	Jacob Isabelle	87
28	Cognard Pierre	87
29	Redoulez Marcel	33
30	Pomirol Claudine	33
31	Chassard-C. Renata	33
32	Noël Marc	29

33	Girard Véronique	91
34	Guichet Phil	92
35	Marko Michel	47
36	Leprevost Anne-Marie	47
37	Hoarau André	34
38	Jagueneau Christiane	17
39	Jagueneau Michel	17
40	Jouvie Cendrine	87
41	Hourcade Mireille	64
42	Papziak Josiane	63
43	Papziak Eugène	63
44	Lamy-Rested Isabelle	91
45	Lamy-Rested Stéphane	91
46	Assailly Monique	79
47	Raymond Nicolas	10
48	Burtey Maurice	03
49	Berger Giselle	63
50	Combes Robert	63
51	Gaumé Jacques	37
52	Gaumé Marie-France	37
53	Hulot Lucie	91
54	Ljo	47

El nia leterkesto.

Mi ricevis tion de Jean Amouroux, mendantapoŝtmarkojn pri la kongreso:

Domaĝe ke la vorto ESPERANTO ne estas grandlitera kaj okulfrappe legebla, ekzemple same kiel la p.m. por PAU 2009. Krome atenti pri elekto de miksitaj koloroj. En nia nuna mondo mi ĉiutage spertas ke «oni» ne ĉiam pensas pri vidhandikapuloj, kiuj nur pene aŭ tute ne povas legi (mal) helajn tekstojn sur aliaj (mal)helaj koloroj aŭ inverse.

Respondo:

Tiu mallonga kritiko entenas du temojn :

1. Pri la grandeco kaj videbleco de la vorto Esperanto.

Via kritiko fontas el via koncepto pri propagando, kun kiu mi ne konsentas: nome, kruda, agresema propagando: grandaj literoj, fulmaj koloroj. Male al tio, mi preferis apenaŭ aluditan signon, kiu necesigas ke oni penu por ĝin malĉifri, pensante ke pro la peno, verŝajne ĝi instaliĝos pli profunde en la menson. Eble mi eraras pri la strategio, sed mi ne faris tion hazarde.

2. Pri la koloroj ne hela sur hela, nek malhela sur malhela.

Pri tio mi ne nur konsentas sed subtenas, kiel heraldika ŝatanto (eĉ taksata fakulo en iuj medioj) - vidu mian artikolon en LS81 p.2, kie mi substrekas la efikon, ekzemple en trafikŝildo.

Tamen poŝtmarko ne estas kruda indikilo, nek nura propagandilo, mi emas klasigi ĝin prefere en artaĵoj, eĉ se nur en minora arto.

Mi ankaŭ estas pentristo, kaj eĉ profesie instruis desegnarion en mezlernejo (mi devis ŝanĝi pro vivcirconstancoj, sed tion mi iel bedaŭras) kaj do tute bone konscias pri legebleco de apudaj samvaloraj koloroj.

Sed arto estas arto, kaj bedaŭrinde ne devas kalkuli kun handikapuloj. Ĉu ĉambra muziko rezignu pri klavico kaj liuto profite al klariono kaj tamburo, pretekste ke estas aŭdhandikapuloj ? Per tiu argumentado, mi tute ne orgojle asertas ke mi ĉefverkis per tiu poŝtmarko, sed ke mi celis produkti nur agrablan bildeton, en kiu propagando estas nur tre flanko celo.

Malmodeste, mi informas ke mi ricevis mendon de Itala kolektanto, kiu gratulis min dirante ke la markoj «*estas tre simpatiaj, bonhumor-vekaj kaj ĉarmaj*». Ili estos eĉ reklamitaj en la organo de ELF-AREK, «La Verda Lupeo».

Lasu min fieri. (Noto grava: ne timu, mi zorgas pri miaj maleoloj)

Serĝo